La 9an de oktobro 2013

Mia alia timo : manko de laborforto

Ĉu Olimpikoj en 2020 en Tokio estas bonveniga afero por regi poluitan akvon en Fukuŝima? Lastatempe mi ofte demandas al mi tiun demandon.

Por la Olimpikoj ni devas konstrui multajn grandajn ludejojn en Tokio, kaj krome oni devas konstrui kaj bonordigi infrastrukuturon. Por tio oni bezonos laborforton. Ĉu Japanio havas sufiĉan laborforton kaj por la difektitaj nuklea centralo de Fukuŝima kaj por preparo por la Olimpikoj? Mi estas tre negativa. Mi timas, ke pro manko de laborforto TEPCO kaj la japana registaro ne povos sufiĉe zorgi pri la katastrofaj reaktoroj. Diversloke ni povas trovi informon pri manko de laborforto.

TEPCO pagis 100000 enojn al administrantoj

La 20an de julio en ĉiuj ĵurnaloj aperis artikolo pri tiu temo. La ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo jene skribis :

« En 2011 kaj 2012 entute 1177 homoj eksiĝis de TEPCO, el kiuj 40% estis administrantoj. Inter aprilo kaj junio en 2013 jam eksiĝis 109 homoj. TEPCO intencas haltigi tiun tendencon per tiu ĉi provizora salajro. La prezidanto de TEPCO s-ro Hirose diras : « Mi volas, ke en tiu ĉi malfacila tempo tiuj administrantoj pli klopodu, sed ĝis nun ni ne povis kompensi ilian laboron. Tiu sumo de 100000 enoj (1000 eŭroj) estas malgranda, sed per ĝi mi volas sendi mian mesaĝon al ili. »

En la sama ĵurnalo de la 1a de aŭgusto oni skribis: « Sinsekve eksiĝas homoj de TEPCO pro la drasta ŝanĝiĝo de la kompanio. En 2011 465 homoj eksiĝis kaj en 2012 712 eksiĝis. Iu estrarano de TEPCO diras, ke kriza estas eksiĝo de kapablaj funkciuloj kaj laboristoj, sed ni ne povas haltigi la reformon de TEPCO .»

Mi volas labori ĝis la forĵeto de la reaktoroj, sed …

(29-jara viro en Fukuŝima)

Post la nuklea akcidento en Fukuŝima mi tuj revenis al la nuklea centralo. Mi antaŭvidis morton, sed mi neniam pensis forkuri de la akcidento, ĉar mi longe laboris tie. Komence mi laboris tiel diligente, ke mi neniam pensis pri mia nuklea elmetiĝo. Multaj eksiĝis pro tro severa laboro, sed mi volonte laboris, kaj fine mi sciis, ke mi elmetiĝis al kelkjara kvanto da radioaktiveco. Ankaŭ mi devis eksiĝi. Nur komence ni estis laŭdataj, sed poste ni estis forĵetitaj. Kiam mi malsaniĝos en estonteco, neniu prizorgos min. Mi volis labori por la centralo, sed nun mia tia volo nebuliĝis.

(la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo la 25an de junio 2013)

Severega laboro por laboristoj

En la nuklea central n-ro 1 de Fukuŝima tage laboras 3000 homoj. TEPCO planas elpreni brulaĵojn el la reaktoroj n-roj 1, 2 kaj 3 ekde 2020. Por tiu laboro en 2013 TEPCO bezonas 500 homojn, sed en 2014, 4600, kaj en 2015, 8000. Por la kompleksaj laboroj TEPCO bezonas spertajn laboristojn.

En nukleaj centraloj, laboristoj povas elmetiĝi maksimume al 50 mikrosivertoj da radioaktiveco por unu jaro por plu labori, kaj 100 mikrosivertoj por 5 jaroj. Ju pli longe laboristoj laboras, des pli multe ili elmetiĝas al radioaktiveco. Do spertaj kaj diligentaj laboristoj sinsekve eksiĝas kaj anstataŭe venas novaj, senspertaj laboristoj. Ĉu tiuj novuloj povas bone plenumi sian laboron ? TEPCO diras, ke ĝi havas sufiĉan laborforton.

Laboro en la centralo estas severega. Multaj plendas pro malalta salajro. Por la laboro pri purigado de tero kaj domoj en la urboj laboristoj ricevas specialan pagon, sed en la centralo ili ne, pro tio laboristoj volas pli labori en la urboj, ol en la centralo.

(la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 10an de septembro 2013)



原発炉心への入口　（「原発　樋口健二写真集」より）

Enirejo al la reaktora kerno (el la Fotaro de s-ro Higuĉi Kenĵi)

Ĉirkaŭ la reaktora kerno estas tre radioakitve, do laboristoj ne povas labori pli ol kelkajn minutojn, pro tio aliaj atendas apude por anstataŭi ilin, sed tro ofta ŝanĝiĝoj de laboristoj malhelpas la glatan laboron, do okazas, ke laboristoj ignoras la averton de dozmetro aŭ laboras sen ĝi.

Homforto elfluas el TEPCO

En la nuklea centralo de Fukuŝima funkciuloj de TEPCO planas kaj laboristoj en la subaj kompanioj plenumas la donitajn taskojn. Iu en tia kompanio diras : « Malmultiĝas funkciuloj, kiuj bone komprenas la situacion en la centralo. Se la gvidkapablo de tiuj funkciuloj malaltiĝos, aperos diversaj problemoj en la laborejoj. »

Iu en la kompanio, kiu kunlaboras kun TEPCO, diras : « Ni varbas laboristojn por laboro en la centralo, sed preskaŭ neniu venas. Homoj iras al la laboro de purigado en urboj, kio estas malpli danĝera.

Oni antaŭvidas, ke kiam komenciĝos konstruado por Olimpikoj, laboristoj iros ekster Fukuŝima, kaj pli malfaciliĝos la varbado.

Sed la ministro de ekonomio kaj industrio estas optimisma : « Ni neniam aŭdas, ke la laborista varbado estas malfacila, nek aŭdas, ke tiu problemo malhelpas la riparadon. »
(la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 25an de septembro 2013)

Laboro por forĵetado de la reaktoroj daŭros por la venontaj 40 jaroj. Ne nur la reaktoroj en Fukuŝima, sed ankaŭ aliaj reaktoroj en aliaj lokoj sinsekve eksiĝos pro maljuniĝo, kaj por tio pli multe da laborforto estos bezonata. Krome okazos Olimpikoj. Korme la ĉefministro Abe lanĉis grandegan projekton “Projekto por pli fortigi la landon”, alinome konstruadprojekton ĉie en Japanio per betono. Krome Japanio ŝrumpas rilate al la loĝantaro. Multiĝas maljunuloj, sed malmultiĝas infanoj, geknaboj kaj junuloj. Se Japanio prosperos dank’ al nova ekonomio nomata Abe-nomiko (= Abe, nomo de la ĉefministro + ekonomiko), malmultiĝos malriĉuloj, kaj des pli malmultiĝos laboristoj en tiuj danĝeraj laborejoj.

Mi timas, ke Japanio fariĝos tombejo de nukleaj reaktoroj kaj ne plu loĝebla. Terura imago, sed ĝi ĉiam obsedas min.

HORI JASUO